DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (916) • 2016



Ĉefa placo en Bratislava.
Foto de Ondrejk /Vikipedio



Ŝtuparo ĉe la kastelo en Bratislava. Foto de Jonik/Vikipedio

## Ĉu vere –
## vi ne vizitis Slovakion?
## vi ne konas ĝian ĉefurbon
## – Bratislava?

### Nepre Vi aliĝu al Kristana Kongreso en Bratislava!

Informiĝu ĉe la sekretario – adreso sur paĝo 2



Nova ponto
Foto de Ondrejk
/Vikipedio

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420723672335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Novjara saluto | 3 |
| Ĉu vi komprenas kion vi legas? Kiel vi legas? | 4 |
| Sesdek bondeziroj | 5 |
| La morto de patrino | 7 |
| Reago pro artikolo en antaŭa numero | 9 |
| Historia renkontiĝo en Havano | 10 |
| Indas ĉiam aserti | 12 |
| Partoprenlisto, daŭrigo | 13 |
| Kilianskirche, Heilbronn | 14 |
| Ne devas esti viroj - la anĝeloj | 15 |
| Wittenber: Luther-statuo | 16 |
| Pestoj - malsanoj de homoj kaj bestoj | 17 |
| Informetoj | 22 |
| Korektoj | 23 |
| Mia Preĝo | 24 |

# Redaktoraj vortoj

Kiel kutime, la nuna numero estas miksaĵo. Espereble vi trovas la artikolojn interesaj. La diverseco iom respegulas la fontojn de la kontribuoj: de plenaj artikoloj – ideoj – bildoj – ĝis traduko de nacia gazetartikolo. Sed nur malmultaj legantoj sendis materialon al mi. Mi atendas vian kontribuon! Pri tio mi skribas ankaŭ aliloke.

Alia temo, kiun mi volas tuŝi, estas la somera kongreso en Bratislava. Tiu estas la ĉefa somera punkto en nia familio. Ĉu ankaŭ vi venos? Espereble jes. Ja estus granda ĝojo (denove) renkonti vin. Antaŭ longe mi spertis ke la partopreno en kongresoj, krom la ĉeestado en kristana rondo, ebligas viziton al kaj ekkonon de aliaj landoj kaj mondpartoj. Kaptu la okazon!

Bonan legadon!

# Novjara saluto

Philippe COUSSON, FR

La jaro 2015 estis por la mondo terura jaro. Krom la jam multaj militoj, la mondo devis sperti teroristajn atakojn, ĉe mi en Francio, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj. La homoj fremdiĝas al la aliaj. Estas tiuj kiuj mortigas blinde aŭ cele, unuope kaj amase, estas tiuj kiuj fuĝas el la milita mizero, el la politika aŭ religia persekuto, el senespera futuro, kaj kiuj tro ofte mortas dum la vojaĝo ĉu sur tero ĉu en la maro, kaj estas tiuj kiuj pro iu imaga timo fermas la pordojn, la limojn.

Nia mondo freneziĝis. Inter tiuj frenezuloj estas tiuj kiuj volas vivi laŭ la imago, laŭ la bildo kiun ili mem konstruis el malnova supozata ora epoko, laŭ la ordonoj de religio kiun ili mem ne konas sed same imagas al si, laŭ politikaj aŭ naciaj valoroj, kiuj neniam estis tiel, kiel ili asertas.

Iom da espero venis, kiam internacia kunveno decidis pri principoj rilate al la klimatŝanĝiĝa minaco.

Ĉu la jarŝanĝiĝo efektive ŝanĝis la situacion kaj la sintenon de homoj? Oni povas dubi. Ĉiaj minacoj restas. Sed restas ankaŭ al ni la espero. Neniu povos preni ĝin de ni. Ni daŭre esperu ke regantoj kaj popoloj zorgos pri la aliaj homoj, pri nia ununura planedo, pri la farto de la malfeliĉuloj kaj de la malriĉaj landoj.

En tio, ni, kristanoj havas grandegan respondecon. Ĉu ni ne estas la salo de la tero kaj la lumo de la mondo? Ĉu la tero sentas tiun plusan guston? Ĉu la mondo vidas tiun brilan lumon?

Ĉu la jarŝanĝiĝo efektive ŝanĝis la situacion kaj la sintenon de homoj? Oni povas dubi. ... Sed restas ankaŭ al ni la espero.

Se ne, ni devas reiri al nia fonto, al nia fido, al nia spirito. Kiel vi legas? Ni reiru al la Biblio, unuope kaj kune, kaj agu laŭe. Tiel la mondo scios pri nia Dio, la Kreinto, pri nia Savanto, ĝia Savanto.

Unuope, ni ne kapablas multon atingi, sed aro da gutaj agadoj certe pli efikos.

Se ne ni, kiu alia povos proklami la gloron de Dio? *Soli Deo Gloria.*

# Ĉu vi komprenas kion vi legas? Kiel vi legas?

## La kongresa temo

Philippe COUSSON, FR

*Jakobo 1*
*23 Ĉar se iu estas aŭskultanto de la vorto, kaj ne plenumanto, li similas iun, kiu rigardas sian naturan vizaĝon en spegulo; 24 ĉar li sin rigardas kaj foriras, kaj tuj forgesas, kia li estis. 25 Sed tiu, kiu fikse rigardas en la perfektan leĝon, la leĝon de libereco, kaj tiel restas, ne estante aŭskultanto, kiu forgesas, sed plenumanto, kiu energias, tiu estos benata en sia faro.*

Oni povas pritrakti la temon de nia baldaŭa kongreso diversmaniere.

Unu el ili estas kompreneble rigardi la diversajn manierojn legi la tekston de nia Biblio, studi ĝin, mediti ĝin, kompari ĉi tiujn manierojn.

Sed gravas ankaŭ kaj precipe tio, kion ni faras el tiu legado, el tiu studado, el tiu meditado.

Tiun punkton levas ĉi tiu mallonga teksto el la epistolo de Jakobo.

Ĉar al kio utilas legi, se nenio ŝanĝiĝas en nia vivo, en nia konduto, en nia maniero vidi la mondon, en nia maniero kompreni la mondon?

Kompreneble eĉ tute profana literaturo, stacidomaj romanoj aŭ romantika poezio povas ŝanĝi la vivon de la leganto. Kaj la legado de la Biblio ne efikus?

Kion oni trovas en la sanktaj skriboj? Kion ili senvualigas? Kion ili rivelas?

Unue nin mem, kio ni mem estas. Ili estas la spegulo, kie oni povas sin vidi kun la propraj trajtoj, intencoj kaj deziroj. Tamen oni povas ne agnoski tiun ĉi sian bildon.

Krome, pli ol ordinara beletro, ili ankaŭ parolas al ni pri la kreinto, pri Dio, eĉ se ni ne volas rimarki tion, aŭskulti tion. Ili parolas pri Lia naturo, pri Lia leĝo, kaj kontraste pri nia naturo, pri nia sinteno.

Tiaj komprenoj povus konduki al senespero por iu ajn klarvidanto, krom se tiu mem rifuzas agnoski la naturon kaj postulojn, eĉ la realon de iu monda fonto.

Tial oni povas trovi plie en tiu libro la mesaĝon pri solvo, pri libereco, pri rekomenco por la unuopa homo kaj la tuta homaro. Tiel en ĝi estas bona novaĵo, Evangelio.

Kiam ni legas persone la Biblion, kiam ni komunume aŭskultas ĝin, ni ankaŭ troviĝas ĉiam denove en tiu situacio, sperti kio estas la efiko de tiu rilato kun la teksto.

Ni do povas en ĉiuj ĉi tiuj okazoj demandi nin, kion mi lernis pri Dio kaj

liaj atendoj, pri ni kaj nia penso kaj konduto, pri la liberigo kaj libereco, kion ni povas ricevi, akcepti, pri la faroj pretigitaj, kiujn ni plenumu.

Legi la Biblion, aŭskulti la Vorton, ne estas simpla distro, simpla paŭzo en la vivo, sed ĉiam nova ekiro, kie fontas nia tuta vivo nuna kaj tuja. El tiuj tempoj ĉe la Vorto, ĉe Dio mem, ni serĉu novan elanon, ĉiam ankoraŭ novan, novan energion. Legi la Biblion ne donas al ni akiron, sed ekiron.

En la teksto de la evangelio laŭ Luko, kie troviĝas tiu demando "Kiel vi legas?" troviĝas ankaŭ tiu ordono . "Iru vi, kaj faru tion saman".

# Sesdek bondeziroj

Julia Sigmond, IT/RO

La unua el miaj naŭ baptogefiloj iĝis 60-jara. Nekutiman donacon ŝi ricevis: mi sendis sesdek bondezirojn al ŝi. Mi tiel sentas, ke ĉi tiuj bondeziroj fakte estas bonaj konsiloj, pro tio mi sendas ilin al vi ĉiuj, kun sincera amo.

01. Estu ĉiam sana!
02. Paco regu cian animon!
03. Sciu, ke la plej forta valuto estas la amo!
04. Estu pacienca ankaŭ kun ci mem!
05. Ridetu al ĉiuj, eĉ al cia spegul-vizaĝo!
06. Ĝoju pro ĉiu bono!
07. Ĝoju pro ĉiu belo!
08. Estu dankema pro cia vivo!
09. Ne forgesu, nur tiu maljuniĝas, kiu ne mortas juna!
10. Pensu pozitive!
11. Sentu cian gravecon!
12. Helpu ĉiujn, eĉ nepetite!
13. Aŭskultu la plendojn de aliuloj!
14. Neniam plendu!
15. Ĉiutage promenu en la naturo!
16. Rimarku, se floro por ci dehiskas!
17. Havu favoratan arbon!
18. Kelkfoje kantu laŭte nur por ci mem!
19. Lernu ripozi!
20. Ĉirkaŭbraku la gemaljunulojn!
21. Sciu, ke la akvo estas la plej grava trinkaĵo por la homo!
22. Lernu taksi la ĝojon de la dono!
23. Pardonu ĉiam al ĉiuj!
24. Instruu aliulojn esperi!
25. Provu konsoli la ĉagreniĝantojn!
26. Cia manplato plenas de karesoj, donu ilin al aliuloj!

27. Respektu cian unuan penson!
28. Notu ciajn interesajn sonĝojn!
29. Respondu al ĉiuj leteroj!
30. Havu verajn sekretojn!
31. Kredu, ke la nuntempa momento pleje valoras!
32. Legu ĉiutage, kiom ajn ci lacas!
33. Sentu la responson de cia grandeco, fronte al formiko!
34. Sentu la gravecon de cia malgrandeco, fronte al la kosmo!
35. Lernu konstante ion!
36. Havu gravajn planojn!
37. Konu bone la forton de la penso!
38. Uzu bone la forton de la vortoj!
39. Havu kuraĝon pardonpeti!
40. Akceptu, ke foje aliuloj pravas!
41. Rekompencu la malbonon per bono, por la ekvilibro!
42. Fojfoje dormu longe, por forigi cian lacecon!
43. Ne permesu al mishumoro regi cian animon!|
44. Plezuru ofte sunleviĝon aŭ sunsubiron!
45. Plantu sekrete florsemojn, kie ne kreskas floroj!
46. Aprecu, ke ci vidas!
47. Aprecu, ke ci aŭdas!
48. Aprecu, ke ci paroli kapablas!
49. Estimu la sentojn de aliuloj, eĉ se ili diferencas de la ciaj!
50. Ne provu ŝanĝi aliulojn!
51. Estu cia propra estro: regu cin mem!
52. Evoluigu ciajn kapablojn ĝis la limo de neebleco!
53. Timu de neniu kaj de nenio!
54. Ne timu de maljuneco!
55. Almenaŭ unufoje dum jaro, havu “ermito-tagon”!
56. Sciu ĉiam, ke ci kapablas je pli multe!
57. Permesu por ci mem foje revadi!
58. Sciu, nur de ci dependas, kion ci altiras!
59. Volu kaj kuraĝu esti feliĉa!
60. Vivu ĉiam konscie!

# Kara leganto

Dum longa tempo, mi nenion/aŭ tre malmulte menciis en miaj enkondukaj Redaktoraj vortoj ke mi volonte ricevas kontribuojn al nia komuna gazeto. La lastajn numerojn mi malfacile plenigis, kaj aldone al aliaj kaŭzoj, tio ankaŭ iom malfruigis la publikigon de la gazeto. Espereble vi samopinias kun mi, ke ni ne publikigu malplenajn paĝojn.

Do, mi denove volas substreki ke Dia Regno bezonas (viajn) kontribuojn diversspecajn. Povas esti fotoj kun kelkaj simplaj klarigoj; ideo / malneta skizo pri okazaĵo; (kruda) traduko de nacilingva artikolo aŭ meme eltrovita temo. Kompreneble ju pli preta la kontribuo estas, des pli ĝi helpas al mi.

Ne hezitu, nur malmultajn kontribuojn mi ĝis nun ne publikigis. Tio kompreneble povas okazi, sed vere malofte okazis. /Redaktoro

# La morto de patrino

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Kiam mi havis nur 13 jarojn, mi spertis tre malĝojan okazon, sed Dio utiligis ĝin por montri al mi la belegan esperon de la Releviĝo.

Mia patrino estis malsana de la koro dum pluraj jaroj. La 26-an de decembro de 1950, ŝi, laŭ sia kutimo, ripozis post la tagmeza manĝo. Estis tempo de la kristnaskferioj. Farmisto el nia preĝejanaro kun siaj du filoj alvenis al nia hejmo por inviti mian frateton kaj min por pasigi du aŭ tri tagojn ĉe ilia farmbieno.

Ni estis tre kontentaj: "Paĉjo, paĉjo, permesu nin foriri kun ili!"

"Momenton, knaboj," diris la patro. "Mi demandos patrinon, kion ŝi opinias pri la afero." Li eniris la ĉambron kaj eliris kun la vizaĝo palega: "Knaboj, patrino estas foririnta!"

La tagon poste, ni iris al la kadavrejo por elekti la ĉerkon kaj plani la enterigon de patrino. Kvazaŭ tio okazus hieraŭ, mi rememoras, ke dum la reiro hejmen, mi sidis en la aŭtomobilo flanke de paĉjo kaj la frateto. Estis tago malvarmega kaj la neĝo kovris ĉion. Tiel mi mem sentis: malvarma kaj sen espero. Mia mondo estis finita.

Tiam, subite, mi sentis la ĉeeston de Dio. (Patrino tre amis Kriston kaj ŝi estis rakontinta, ke ŝi akceptis Lin kiel sia Savanto, kiam ŝi havis 16 jarojn.) Mi estas leginta la Sanktajn Skribojn ekde la aĝo de ok jaroj. En tiu momento, mi komprenis tion, kion mi legis en la Biblio pri la Releviĝo kaj tion, kion mia patro estis predikanta pri la Releviĝo de Jesuo Kristo kaj la venonta Releviĝo de tiuj, kiuj amas Lin. Mi komprenis ankaŭ ĉi-tiun vorton de Jesuo: *"Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li (aŭ ŝi) estas mortinta, tiu vivos."* (Evangelio laŭ Apostolo Johano 11, 25)

Sidante tie en la aŭto, mi sentis, ke la malĝojo malaperis antaŭ la certeco: "Patrino ne estas en la ĉerko! Nur ŝia ŝelo estas tie. Patrino estas kun Kristo. En la Tago de la Releviĝo, mi vidos ŝin denove!" Dum ŝia enterigo, mi sentis tian fortan ĝojon, ke mi ne verŝis eĉ unu larmon. Kompreneble, mi sentis ŝian mankon, sed mi sentis ankaŭ la ĝojigan esperon de la Releviĝo. Tiu espero baziĝas firme sur la Vorto de Dio. Ekzemple, la Apostolo Paŭlo (inspirita de la Sankta Spirito) skribas en 1-a Korintanoj 15, 51-52:

*"Jen mi sciigas al vi misteron: Ni ne ĉiuj dormos, sed ni ĉiuj ŝanĝiĝos, en momento, en okula ekmovo, ĉe la lasta trumpetsono: ĉar la trumpeto sonos, kaj la mortintoj releviĝos senputraj, kaj ni ŝanĝiĝos.*"

La Apostolo skribas ankaŭ en 1-a Tesalonikanoj 4, 13-18:

*Sed ni ne volas, fratoj, ke vi ne sciu pri tiuj, kiuj endormiĝis; por ke vi ne*

*malĝoju, kiel la ceteraj, kiuj havas nenian esperon. 14 Ĉar se ni kredas, ke Jesuo mortis kaj releviĝis, tiel ankaŭ tiujn, kiuj endormiĝis en Jesuo, Dio venigos kun Li. 15 Ĉar ni diras al vi per la vorto de la Sinjoro, ke ni, kiuj estos vivaj, restantaj ĝis la alveno de la Sinjoro, tute ne havos lokon antaŭ la endormiĝintoj. 16 Ĉar la Sinjoro mem malsupreniros de la ĉielo, kun signalkrio, kun la voĉo de la ĉefanĝelo, kaj kun la trumpeto de Dio; kaj la mortintoj en Kristo leviĝos la unuaj; 17 poste ni, kiuj vivas, ankoraŭ restantaj, estos kune kun ili suprenkaptitaj en la nubojn, por renkonti la Sinjoron en la aero; kaj tiel ni estos por ĉiam kun la Sinjoro. 18 Tial per tiuj vortoj konsolu unu la alian.*

Jesuo Kristo releviĝis el la mortintoj kaj Li vivas. La Biblio donas al ni la esperon ke Li revenos kaj suprenkaptos tiujn, kiuj amas Lin. Sed unue, la personoj mortintaj, kiuj fidis al Li ricevos novajn korpojn, "*kaj tiel ni estos por ĉiam kun la Sinjoro*." Estas pro tiu belega vero, ke mi neniam preĝas dum pli ol 65 jarojn por la paco kaj la ripozo de patrino. Laŭ la Vorto de Dio, mi SCIAS, ke ŝi ripozas kun Kristo. Mi SCIAS, ke je la tago de la Releviĝo ŝi ricevos novan korpon. Mi SCIAS, ke mi vidos ŝin denove.

Kia grandega konsolo!
Kia grandega espero!

## El *Preĝo por ĉiu Tago*

**13. februaro**

Ĉiela Patro, riĉigu min per la kono de Via vero, por ke mi povu riĉigi aliajn. Ĉiun tagon mi ĉerpu novan forton el Via Vorto. Gardu min kontraŭ malicaj pensoj, kiuj malvalorigas la vivon.




de Jelly Koopmans-Schotanus

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono).

# Reago pro artikolo en antaŭa numero

## *Kara Redaktoro,*

Jam de pli ol 5o jaroj mi legas nian gazeton Dia Regno. Multfoje mi estis ravita de interesaj kaj valoraj artikoloj, raportoj, kelkfoje ne tute. Sed mi lernis de apostolo Paŭlo, ke ni akceptu unu la alian, do mi ne permesis al mi pli seriozan kritikon kontraŭ – laŭ mi – tro infanecaj atestoj. Eĉ mi pensis, ke ni okcidentaj kristanoj jam tiomgrade perdis nian simplan, infanecan kredon, ke nun el la tria mondo niaj "nov-kristanaj" gefratoj estos niaj misiistoj.

Tiel mi povis legi la artikolojn de Vilĉjo GOLDSMITH ofte kun duboj, speciale pri la potenco kaj atakemo de malbonaj spiritoj, demonoj. Mi serioze kredas, ke Jesuo Kristo venkis super la Satano! Sed ĉi lasta artikolo, kiu aperis en la antaŭa numero de DR tute indignigis min. …..

Mi sincere kredas je tio, ke ni povas kaj rajtas peti helpon de nia Ĉiela Patro, eĉ nia Sinjoro Jesuo Kristo kuraĝigas, instigas nin: "*petu en mia nomo ion ajn de la Patro"* Sed tiu petado ne estas perŝnura tirado de pupo! Nia Patro ja estas la Ĉiopova Dio!

Jesuo prezentas al ni sian Patron kompatema kaj bonkora. "*...estu filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo, ĉar Li levas Sian sunon sur la malbonulojn kaj bonulojn, kaj sendas pluvon sur la justulojn kaj la maljustulojn.* (Mat 5,45)

"*... Li estas bona al la nedankemuloj kaj malbonuloj. Estu kompatemaj, kiel via Patro estas kompatema*". (Luk 6,35-36)

Mi trovas tre malinda tiel fari reklamon por Dio ke: vidu la tuta regiono suferas pro la sekeco, sed super la terpeco de la kristanino Dio donas pluvon!

Kara Frato Redaktoro, dum mia longa vivo mi konis ankaŭ kelkajn redaktorojn kaj ĝenerale ili plendis, ke malmultaj artikoloj kolektiĝas por aperigi ilin. Mi iom komencas dubi ĉu ne nur la verkantoj sed ankaŭ la legantoj estas malmultaj. Aŭ oni legas ion, konsentas aŭ malkonsentas, sed ne interesiĝas pri la tuta afero tiom, ke oni reagu pri tio legita nur flankenmetas ĝin. Tio estas kompreneble kaj memkritiko, kaj plendo. Mi sendis jam artikolojn, pri kiuj mi pensis, ke post la apero ekestos diskutoj en nia gazeto, sed nenio okazis. Ĉu oni ne rimarkis tion, ke revoluciaj ideoj estis en ili? Aŭ tute simple ni ne estas skribemaj?

*Éva Farkas-Tátar*

# Historia renkontiĝo en Havano, Kubo

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

La papo Francisko kaj la patriarko Cirilo de Moskvo renkontiĝis post preskaŭ 1000 jaroj.

Simila renkontiĝo inter la papo kaj la kapo de la Rusa Ortodoksa Eklezio neniam okazis. La unuiĝinta kristana mondo finiĝis en 1054. Ĉijare, la 12an de februaro 2015, preskaŭ 1.000 jarojn poste, renkontiĝis papo Francisko kaj patriarko Cirilo el Moskvo sur neŭtrala tero en Kubo.

La kunveno intence okazis malproksime de Eŭropo por ke neniu estu hejme. En la flughaveno de Havano, en absolute ne-religia loko, tiuj du havis sian kunvenon, kiu daŭris kelkajn horojn.

“Finfine! Ni estas fratoj”, diris la papo, kiam li brakumis la patriarkon en speciala ĉambro de la flughaveno en Havano.

La kunveno estis rezulto de intensa Vatikana diplomatia laboro, kiu daŭris plurajn jarojn. Kaj Johano Paŭlo II kaj Benedikto XVI, provis vane aranĝi kunvenon, sed nur nun la tempo estis matura. Laŭ la ambicio de Francisko, la Vatikano devas ludi pli aktivan diplomation rolon. Por ke la nuna renkontiĝo okazu, multe dependis de la agado de Francisko. Li ne petis la ortodoksan



Cirilo la 1-a. Foto de: www.kremlin.ru



Francisko en 2014 Foto de: korea.net

patriarkon veni al Romo kaj li ankaŭ ne proponis, ke li mem iru al Rusio. Li diris simple: ”Kie, kiam kaj kiel la patriarko volas.”

Tiel estiĝis ekstra halto en Kubo, kiu kuŝas laŭ la papa itinero jam planita al Meksiko. La patriarko vizitis Kubon oficiale kaj venis jam tagon antaŭe.

“La plej grava afero dum la renkontiĝo estas la persekutado de kristanoj en Afriko kaj la Proksima Oriento. Ĝi tuŝas ambaŭ”, diris la metropolito Hilarion Alfejev, kiam la kunveno estis prezentita semajnon antaŭ la okazo. Li respondecas pri la internaciaj rilatoj de la Rusa Ortodoksa Eklezio. Prezento okazis samtempe en Vatikano.

Francisko jam parolis maltrankvile pri “tria mondmilito, kiu okazas en kelkaj diversaj lokoj”. En mondo, kie la minacoj, perforto kaj terorismo estas kreskantaj, li evidente havas ekumenan planon, kiu estas transponti la diferencojn kaj konfliktojn. La ĵusa renkontiĝo en Kubo estu komprenata en tiu lumo, ankaŭ la provaj diplomatiaj kontaktojn kun Ĉinio. Kaj kompreneble ankaŭ la aŭtuna vojaĝo al Svedio oktobre, kiam la papo, kune kun la Tutmonda Asocio Luterana en Lund komencos la feston pri tio, ke antaŭ 500 jaroj Martin Luther najlis siajn tezojn sur la preĝejan pordon en Wittenberg.

Kial nun tio-ĉi okazas?

“Ni vivas en internacia drama situacio. Kial resti en malakordo kiam niaj senkulpaj fratoj estas murditaj de ekstremistoj!” diras Kardinalo Walter Kasper en la itala gazeto REPUBBLICA, responde al tiu demando.

Komuna komunikaĵo venos de la du gvidantoj en kiu antaŭvideble ili esprimas siajn komunajn maltrankvilojn por la situacioj en Irako kaj Sirio.

Post la renkontiĝo papo Francisko daŭrigis sian kvintagan viziton al Meksiko.

(Bazita sur artikoloj de Peter Loewe en Dagens Nyheter kaj de SVT Nyheter)

Jam pasis 962 jaroj ekde la du eklezioj iris siajn apartajn vojojn pro politikaj kialoj. Tiun okazaĵon oni nomumas la *Orienta Skismo*. Ĝi baziĝis sur la fakto ke Romo kaj Konstantinopolo drivis dise geografie, lingve kaj politike. Kiam patriarko estis enoficigita en Konstantinopolo la demando leviĝis pri la papa suvereneco. La skismo finiĝis la jaron 1054 kun la reciproka ekskomuniko de la papo Leono IX kaj la patriarko Mikaelo la 1-a Kerulario.

Kelkaj gravaj jaroj:

1054: La Orienta Skismo kondukas al reciproka ekskomuniko. La kristana eklezio partiĝis en Roma kaj Ortodoksa partoj.

1453: Konstantinopolo falas, konkerita de la Otomana Imperio.

1517: Lutero najlas siajn 95 tezojn en Wittenberg kiuj kritikas la Katolikan eklezian komercon en indulgoj.

1929: La Vatikano kreita post kompromiso (Laterana pakto) inter Pio XI kaj la Reĝlando de Italio, reprezentita fare de Benito Mussolini.

2016: Historia kunveno en Kubo inter la papo kaj la patriarko de Moskvo.

# Indas ĉiam aserti

Henriel Fidilalao, Madagaskaro

Ne facila estas la vivo de homoj en afrika lando kiel Malagasio, des malpli tiu de la lokaj kristanoj, sed ni povas aserti ke Nia Sinjoro Kristo Jesuo aŭskultadas nian preĝon kaj respondas al niaj petoj en favora momento.

Eble la nuna moderna mondo ne plu bezonas aŭskulti la atestadon faritan de kristanoj, sed nia ĉiutaga vivo estas miraklo. Laŭ statistiko, averaĝe duono de la loĝantaro (ĉ. 23 milionoj) estas kristanoj kaj problemo pri religio kaj religia kunvivado ne estas konata en nia lando. Kristanoj povas diri, ke Dio protektas nin kontraŭ triba kaj civila milito malgraŭ tio, ke jam delonge potencaj landoj kaj grupoj de fihomoj provis provoki tion, sed ĉiam malsukcesis.

Des pli, ke Dio donis al ni unikan lingvon ebligante al ni ĉiuj interkompreniĝi unu kun la alia. Dio provizas al Malagasoj la eblecon postvivi malgraŭ la profunda mizero en kiun nia lando sinkas pli kaj pli. La Monda Banko ĵus konfirmis ke la malriĉeco trafas 92% de Malagasoj. Mi bedaŭras nur ke ne sufiĉe solidariĝas la lokaj kristanoj pro disdividaj tendencoj inter sektoj/grandaj eklezioj. Tion profitas islama religio, kiu "subvencias" islamajn virojn (precipe en la nordo de la lando), kiuj kvankam nelaborantaj, akiras monon de eksterlando kaj ebligas al si allogi malagasajn virinojn por edziniĝi al ili.

"Henriel Fidilalao, la sola malagasa Esperanto-poeto, naskiĝis en Madagaskaro antaŭ 40 jaroj. Magistriĝis pri la instruado de la lingvo kaj literaturo franca. Instruis la francan lingvon en ŝtata gimnazio kaj liceo; nun mastrumas Esperanto-firmaon pri importado kaj eksportado. Patro de kvar filoj. Esperantisto ekde 1986. Diplomita Cseh-instruisto, prezidanto de la Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj. Verkas poemojn kaj prozon, tradukas el Esperanto malagasen, kaj el la malagasa kaj franca en Esperanton, partoprenas en kompilado de la Esperanta-malagasa kaj malagasa-Esperanta vortaroj. Antaŭnelonge estis eldonita lia koresponda kurso de Esperanto por malagasoj."

Laŭ La Ondo de Esperanto Nr 8-9, 2006



La islama viro rajtigas al la malagasaj edzinoj resti kristaninoj sed malpermesas tion al la naskitaj gefiloj, kiuj devas sekvi lin en lian moskeon.

Krom tio, stariĝas tie kaj ie islamaj lernejoj kaj kuracejoj, kiuj akceptas malriĉulojn. Moskeoj pliiĝas en grandaj urboj kaj multaj junaj Malagasoj akiras stipendion por studi en islamaj universitatoj en aliaj landoj.

Sed tio ne malkuraĝigas la malagasajn kristanojn. Ni daŭrigas preĝi favore al nia lando kaj ni fidas je la interveno de Jesuo Kristo por kuraci ĝian malsanon. Ĝi ja estas malsana de 2009 ĝis nun, manko de sekureco iĝas pli grava, la nuna elektra kurento en la tuta lando ne plu sufiĉas, nia monvaluto forfalas tagon post tago, koruptado regas ĉie kaj niaj riĉaĵoj estas ŝtelitaj de potencaj landoj kaj kelkaj lokuloj privilegiitaj.

Ni ne malesperas, ĉar ni havas Kriston Jesuon kun ni al kiu nia reĝino Ranavalona 2a oficiale "konfidis" sian regnon meze de la 19a jarcento. Mi esperas ke Nia Sinjoro ne forgesas tiun pakton, kiun tiu reĝino nia faris kun Li.

Mi anticipe dankas tiujn, kiuj preĝas ankaŭ por ni en tiu fora suda hemisfero!

Jesuo Kristo benu vin ĉiujn kaj lia paco estu ĉiam en via koro.

FIDILALAO Henriel
Ambohidrapeto
Malagasio/Madagaskaro
<henrielredtv@gmail.com>

---

## 66a Kristana Kongreso de KELI


### Bratislava, Slovakio, 16. – 23. 7. 2016

Temo: Ĉu vi komprenas kion vi legas? Kiel vi legas?

## Daŭriga listo de aliĝantoj al 66-a KELI kongreso

| | | |
|---|---|---|
| 17. | Krüger Siegfried, | Germanio |
| 18. | Puijenbroek Ruth, | Svislando |
| 19. | Bisset David, | Britio |
| 20. | Bisset Jean, | Britio |
| 21. | Parkanyine K. Erzsebet, | Hungario |
| 22. | Schaeffer Hedwig, | Germanio |
| 23. | Schaeffer Karl Heinz, | Germanio |
| 24. | Ojasild Joonatan, | Estonio |
| 25. | Polnický Tomáš, | Ĉeĥio |
| 26. | Polnická Miloslava, | Ĉeĥio |
| 27. | Pospíšilová Ria, | Ĉeĥio |
| 28. | Panáčková Emílie, | Ĉeĥio |
| 29. | Chrdle Petr, | Ĉeĥio |
| 30. | Landfors Anna | Svedio |
| 31. | Landfors Mats | Svedio |
| 32. | Järlström Agneta | Svedio |

# Kilianskirche, Heilbronn





La apuda vitralo estas parto de granda fenestro en la protestanta ĉefpreĝejo Kilianskirche en mia urbo Heilbronn.

La artisto estis la germano Charles Crodel ĉirkaŭ la jaro 1960. La vitralon mi nur atente rimarkis post la invado de fuĝintoj en nian urbon, en Eŭropon! Kiel aktuala!

La temo estas la fuĝo al Egiptio, priskribita en Mat 2,13-23.

Ege imponas min la anĝelo, kiun mi deziras al la fuĝintoj kaj al la legantoj.

Tre kore salutas
Siegfried KRÜGER, DE



# Ne devas esti viroj kun flugiloj, la anĝeloj

Ne devas esti viroj kun flugiloj,
la anĝeloj.
Ili iras mallaŭte, ili ne devas krii,
ofte ili estas maljunaj kaj malbelaj kaj malgrandaj,
la anĝeloj.

Ili ne havas glavon, nek blankan vestaĵon,
la anĝeloj.
Eble estas unu, kiu donas al vi la manon,
aŭ li loĝas apud vi, muro ĉe muro,
la anĝelo.

Al malsatulo li alportis la panon,
la anĝelo.
Al malsanulo li preparis la liton
kaj li aŭdas, se vi vokas lin en la nokto,
la anĝelo.

Li staras survoje kaj li diras: Ne,
la anĝelo,
granda kiel fosto kaj malmola kiel ŝtono –
ne devas esti viroj kun flugiloj,
la anĝeloj.

*Rudolf Otto Wiemer*

Tradukita de Siegfried Krüger
Kun afabla permeso de la heredintoj

# Wittenberg: Luther-statuo ricevas blindigan bendon

Laŭ artikolo en retgazeto Jesuo.de
Ideon donis Siegfried Krüger




La mondfama statuo de Luther en Wittenberg ricevis blindigan bendon, kiel signo pri la antisemitismo de la reformistoj. La flavan bendon metis la direktoro de la protestanta akademio de Sachsen-Anhalt.

La ago estas alvoko al malproksimiĝo, for de la malamo de Luther kontraŭ la judoj. Ni devas montri kiel la reformisto estis blinda en tiu afero. Tamen, Luther estis klarmensa kaj malkovris multajn novajn aferojn. La bandaĝo estis forigita dum la 532a naskiĝtago de Luther, tamen.

La kovrado estas parto de kampanjo de la konsilantaro de Evangelia Eklezio en Centra Germanio por la kristana juda dialogo.

En 1821 oni dekovris wittenbergan monumenton al Martin Luther (1483-1546). Ĝi estas konsiderata la plej malnova germana Luther-memoraĵo. Nur kelkajn metrojn apud la statuo de Luther, oni inaŭguris memoraĵon de lia amiko, la polihistoriisto Philipp Melanchthon (1497-1560).

Martin LUTHER (10-a de novembro 1483 – 18-a de februaro 1546). La 31-an de oktobro 1517 li najlis siajn 95 tezojn al la pordego de la preĝejo de Wittenberg, lia protesto kontraŭ la korupteco en la katolika eklezio. Ĉi tiu ago estis la origino de protestantismo. Kaj ankaŭ la origino de luteranismo, la unua protestanta sekto, kiu ankoraŭ estas la akceptita konfesio en Germanio kaj Skandinavio. Ekster ĉi tiu regiono, la akceptita protestantismo estas tiu de Zvinglo kaj Kalvino, kiu estis disvolvigita en Svislando dum 1520-60, kaj nun floras precipe inter anglalingvanoj kaj en Hungario.

Kvankam Luther protestis kontraŭ la korupteco de la Eklezio, lia doktrino estis hereza laŭ katolikismo: li protestis ne nur kontraŭ la korupta uzo de aŭtoritato en la Eklezio, sed kontraŭ la ideo de aŭtoritato mem: la aŭtoritato de la Eklezio ne nur estis misuzita, sed estis senlegitima en si mem.

La ĉefaj doktrinoj de Lutero, kiuj fariĝis la koro de protestantismo:
sola fide; sola scriptura; la pastrareco de la kredantaro.

El Vikipedio - kapvorto Marteno Lutero

# Pestoj – malsanoj de homoj kaj bestoj

Prelego por Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno,

Oldřich Arnošt Fischer, CZ

Pestoj estas infektaj malsanoj, kiuj rapide disvastiĝas kaj mortigas plimulton da sentema populacio. Kaŭzantoj de pestoj estas diversaj: fungoj, bakterioj kaj virusoj. Ankaŭ transmitantoj* kaj vojoj de transmitado* estas diversaj.

La sekva teksto estas ĉerpo el la plena prelego. /Redaktoro

## Pesto de homoj

Kaŭzanto estas bakterio *Yersinia pestis.* Sentemaj organismoj estas kelkaj specioj de ronĝuloj, kameloj kaj homoj. Rezervujoj estas sovaĝaj ronĝuloj (ratoj, zizeloj, gerbiloj k.a.). Transmitanto estas la pulo *Xenopsylla cheopis* (kaj ankaŭ 50 aliaj pulaj specioj, sed ne ĉiuj specioj transmitas la peston facile).

En naturo la malsano ekzistas inter ronĝuloj, kiuj estas rezervujoj de la bakterio. La ronĝuloj aŭ malsaniĝas aŭ ne malsaniĝas. Puloj povas ataki kamelojn aŭ homojn (vojaĝantojn, ĉasistojn, turistojn), kiuj proksimiĝas al terkavoj de la ronĝuloj. Tio estas naturaj fokusoj de la pesto.

Mongolaj paŝtistoj (aratoj) jam en mezopoko sciis, ke se mortas ronĝuloj, baldaŭ ekmortos kameloj kaj poste ankaŭ homoj. Tial ili ĉirkaŭbarilis la fokusojn per ŝtonoj, por averti aliajn homojn. Hindoj forlasis siajn hejmojn, se mortintaj nigraj ratoj (*Rattus rattus*) estis trovataj.

La pulo *X. cheopis* suĉas sangon de nigraj ratoj (*R. rattus*), kiuj en antikva epoko kaj mezepoko ofte troviĝis en grenejoj, domoj kaj ŝipoj. La puloj transmitis la peston al homoj precipe en urboj. Tiel ekestis urbanaj fokusoj de la pesto.

La bakterio *Yersinia pestis* multipliiĝas en stomako de pulo kaj amaso da novaj bakterioj obstrukcias kropon (antaŭstomakon) de la pulo. La pulo jam estas malsata, sed kaŭze de amaso da bakterioj en kropo ĝi ne povas suĉi sangon de homo. Tial ĝi saltas el unu gastiganto al la alia, pikas kaj infektigas homojn kiel vivanta saltanta injektilo.

La pesto havas du formojn: bubonan peston kaj pulman peston. La bubona pesto estas transmitata de puloj (precipe *X. cheopis*). Plej ofte la bakterio multipliiĝas en limfonodoj, kie kaŭzas pusan inflamon. La limfonodoj, precipe en ingvenoj, estas pligrandiĝitaj kaj fariĝas abscesoj (bubonoj), kiuj estas plenaj de puso kaj sango. Tiam la abscesoj sub

* La aŭtoro uzas la ne-PIVan vorton “transmiti” plurloke en la artikolo. Transmiti estas uzata i.a. en Vikipedio. La laŭ-PIVa ekvivalento povus esti “transmisii”. /red

haŭto aspektas kiel nigraj. Tial oni nomis la peston "nigra morto".

La pulma pesto estas transmitata per guta infektado, kiam malsanulo eltusas la bakterion *Y. pestis*. Ĉefa simptomo de pulma formo de pesto estas grava pneŭmonio kun alta febro.

Origine ekzistis nur lokaj fokusoj de pesto inter ronĝuloj de Azio kaj Afriko. La malsano kun la ronĝuloj trapasis Markolon Bering kaj disvastiĝis en Ameriko antaŭ alveno de la unuaj homoj (eskimoj kaj indianoj) el Azio.

Katastrofo ekestis, kiam homaro fariĝis multenombra. Homoj kapablis rikolti multe da greno kaj plenaj grenejoj allogis ronĝulojn, precipe ratojn. Rataj puloj (*X. cheopis*) transmitis la peston al homoj.

En sumera eposo pri Gilgameŝo estas priskribita pesta epidemio en la urbo Uruk. Sumeroj timis la peston, kaj havis specialan paganan dion de la pesto, kies nomo estis Erra. Kiam la dio Erra vizitis la urbon Uruk, multe da mortintoj kuŝis sur placoj kaj stratoj de la urbo aŭ flosis en la rivero Eŭfrato.

En la Biblio estas priskribita pesta epidemio inter filiŝtoj kiuj batalis kontraŭ judoj: "*... la mano de la Eternulo faris en la urbo tre grandan tumulton, kaj li frapis la loĝantojn de la urbo, kiel la malgrandajn, tiel ankaŭ la grandajn, kaj aperis sur ili tuberoj.*" (1 Sam 5, 9) – La "tuberoj" estis pestaj abscesoj.

Alia granda pesta epidemio savis loĝantojn de Jerusalem kontraŭ asiriaj konkerantoj. Asiria reĝo Sanĥerib volis konkeri la urbon, sed lia armeo estis preskaŭ neniigita de la pesto: "*En tiu nokto eliris anĝelo de la Eternulo kaj frapis en la tendaro de la Asirianoj cent okdek kvin mil. Kiam oni leviĝis matene, oni ekvidis, ke ili ĉiuj estas kadavroj senvivaj. Kaj Sanĥerib, la reĝo de Asirio, elmoviĝis kaj iris kaj rehejmiĝis kaj restis en Nineve.*" (2 Reĝ 19, 35-36) – Subita morto de 185 000 asiriaj soldatoj (verŝajne de rapida, perakuta formo de la pesto) ŝanĝis historion.

En la jaro 542 post Kristo la pesto atakis Bizancon, kies imperiestro estis Justiniano. Dum tiel nomata Justiniana pesto formortis duono da loĝantoj de orientromia imperio. La pesto furiozis tiel forte, ke ĉiutage en Bizanco mortadis 5-10 miloj da homoj. Terura epidemio disvastiĝis en Egiptio, Palestino, Turkio kaj en la jaroj 544–570 en Francio kaj Anglio.

Epidemion, kiu trafas multe da landoj oni nomas "pandemio".

La dua pandemio ekestis en la jaro 1050 en Mezopotamio. La pesto disvastiĝis en Hindio, Mezazio kaj Ĉinio. En la jaroj 1100–1200 estis trafitaj Egiptio kaj Sirio. Kruckavaliroj, kiuj revenis hejmen el Palestino, disvastigis la peston en Eŭropo.

En la 14-a jarcento la pesto atakis Krimeon. Komercistoj alportis ĝin en Italion sur siaj ŝipoj, en kiuj troviĝis infektitaj nigraj ratoj (*R. rattus*). En la jaro 1346 la pesto aperis en Sicilio, en fino de la jaro 1347 en franca haveno Marseille kaj en la jaro 1348 ĝi atakis Hispanion, Francion, Germanion, niajn landojn (kie tiam reĝis Karolo IV) kaj Skandinavion. Oni supozas, ke tiam en Eŭropo mortis 25 milionoj da homoj kaj en la tuta mondo 75 milionoj da homoj.

Homoj longtempe ne sciis kaŭzanton


de la pesto. Kuracistoj kuracis nur simptomojn de la pesto. Ili batalis kontraŭ febro kaj tranĉis abscesojn. Malespere ili kredis, ke la pesto estas puno de Dio. Procesioj de skurĝantoj batis sin, por savi homojn for de la malsano, sed vane. Aliaj homoj akuzis judojn, ke ili venenigis putojn, kaj aranĝis pogromojn kontraŭ judoj. Sed ankaŭ persekutitaj judoj suferadis de la pesto.

Multaj malsanuloj restis en siaj hejmoj sen helpo, ĉar la homoj timis la peston. Kuracistoj ne ĉiam aŭdacis helpi. Se ili volis kuraci malsanulojn, ili prenis specialajn "kontraŭpestajn" vestaĵojn. Viktimoj estis ankaŭ inter pastroj kaj gemonaĥoj, kiuj zorgis pri malsanuloj.

Sed kelkaj homoj kapablis pensi racie. En ĉeĥa literaturo konserviĝis kvin verkaĵoj pri la pesto, kiujn verkis Sigismundo Albík el Uničov (1347-1360? – 1427), kiu estis bona juristo, ĉefepiskopo kaj persona kuracisto de la reĝoj Venceslao IV kaj Sigismundo Luksemburga. Albík verkis *Compendium medicinae* [Medicina kompendio] kaj *Regimen sanitatis seu Vetularius* [Reguloj por la sano], sed bedaŭrinde tiuj homoj, kiuj plej multe bezonis liajn konsilojn, ne komprenis latinan lingvon aŭ ne sciis legi.

Dekano de Karola Universitato Křišťan el Prachatice (1366–1439), kiu estis amiko de Magistro Johano Hus (1371? – 1415), verkis artikolojn pri la pesto latine, sed en siaj "Kuracistaj libroj" li ĉeĥe rekomendis al homoj observi higienon. Pro uzado de ĉeĥa lingvo liaj libroj estis tre popularaj. Dum la jaroj 1496–1497 Jan Čern (1456?–1530) verkis la libron "Pri pestaj malsanoj kaj kiel homoj devas konduti antaŭ kaj dum la pesto", kiu estis dum la jaroj 1506–1623 multfoje publikigita. Čern rekomendis al homoj observi higienon kaj fuĝi el la loko, kie la pesto aperis. Riĉuloj kaj potenculoj havis pli grandan ŝancon fuĝi ol malriĉa popolo.

La unuan efikan mikroskopon, kiu estis taŭga por observado de bakterioj, konstruis Antony van Leeuwenhoek (1632-–1723) en la 17-a jarcento, sed daŭris multe da jaroj ĝis ekesto de nova



La mapo montras la disvastiĝon en Eŭropo dum la 14a jc.

scienca disciplino – bakteriologio. Sciencistoj devis paŝon post paŝo ellerni izoladon de bakterioj el obdukcia* materialo, laboron kun bakteriaj kulturoj, koloradon kaj observadon de bakterioj, kaj pliperfektigi bakteriologiajn metodojn.

En la jaro 1894 priskribis kaŭzanton de la pesto du bonegaj sciencistoj, japana bakteriologo Ŝibasaburo Kitasato (1853–1931) kaj pli juna franca bakteriologo Alexandre Yersin (1863–1943). Ili ambaŭ laboris en Hongkongo, kie furiozis epidemio de la pesto. Ili obdukciis mortintojn kaj serĉis bakterion, kiu kaŭzas la peston, en obdukcia materialo. Pli aĝa Kitasato hastis publikigi sian trovaĵon. Tial li erare skribis, ke la bakterio, kiun li trovis en obdukcia materialo, estas movebla. Yersin publikigis pli precizan priskribon de la bakterio, kaj korekte skribis, ke la bakterio estas nemovebla. Tial la bakterio estis nomigita *Yersinia pestis* laŭ Yersin.

La unuan vakcinon kontraŭ la pesto preparis Waldemar Mordeĥai Wolff Haffkine (1860–1930) en la jaro 1897. En la jaro 1898 franca esploristo P.L. Simond trovis la bakterion *Y. pestis* en intestoj de puloj. Li tiel atestis, ke la pulo *X. cheopis* transmitas la peston.

Kiam homoj ĉesis loĝadon en lignaj domoj, kiuj estis taŭgaj por nigraj ratoj (*R. rattus*), la pesto jam ne havis grandan ŝancon disvastiĝi, ĉar al nigraj ratoj ŝtonaj domoj ne plaĉis. Krom tio nigraj ratoj estis baldaŭ anstataŭitaj de norvega (bruna) rato (*Rattus norvegicus*), kiu estas pli agresema, sed ne estas gastiganto de la pulo *X. cheopis*, kiu transmitas peston.

> Sed ekzistis homoj, kiuj uzis la malsanon kontraŭ aliaj homoj. ... eĉ en la dudeka jarcento.

Sed ekzistis homoj, kiuj uzis la malsanon kontraŭ aliaj homoj. Jam en antikva kaj mezepoka epokoj soldatoj de konkerantaj armeoj ĵetis korpojn de mortintoj en fortikaĵojn, por ke defendantoj de la fortikaĵoj mortu de la pesto.

Bedaŭrinde eĉ en la dudeka jarcento uzis sciencistoj la peston kontraŭ aliaj homoj. Dum la dua mondmilito japana armeo uzis la peston kiel batalilo kontraŭ ĉinoj, koreanoj, mongoloj kaj manĉuroj. Speciala taĉmento 731, maskita kiel "taĉmento de kuantunga armeo por prevento de epidemioj kaj purigado de akvo", preparis en specialaj laboratorioj grandan kvanton da vivantaj puloj, kiuj estis intence infektigitaj de la bakterio *Y. pestis*. La puloj estis disvastigitaj inter loĝantoj de atakitaj landoj (japanaj soldatoj uzadis specialajn granatojn kaj bombojn, kiuj estis plenigitaj de vivantaj puloj). Kelkaj militkaptitoj el la taĉmento 731 estis post la dua mondmilito juĝitaj de sovetoj en Ĥabarovsk (1949). Usonanoj siajn militkaptitojn el la sama taĉmento (731) ne juĝis, sed liberigis ilin kaj uzis iliajn sciojn kaj spertojn por

* La aŭtoro uzas la ne-PIVan vorton "obdukcii" plurloke en la artikolo. "Obdukcio" signifas postmortan ekzamenon de kadavro. "Obdukcio" estas uzata i.a. en Vikipedio.

evoluo de propraj bakteriologiaj armiloj.

La pesto tiel multe influis vivon de niaj antaŭuloj, ke en ĉeĥa lingvo oni ĝis nun uzadas frazojn, kiuj devenas el epoko de pestaj epidemioj. Oni ofte uzadas la vorton “kvaranteno“. En mezepoko la ŝipo, kiu proksimiĝis al haveno, devis resti sur la maro kvardek tagojn kaj proksimiĝi nur se estis certa, ke neniu el ŝipanaro post kvardek tagoj suferas de pesto. “Kvardek“ oni itale diras “*quaranta*“ kaj el tio devenas la vorto “kvaranteno“.

Se homo tusas aŭ ternas, oni ofte diradas: “La Dio sanu vin!“ [*Pozdrav Pámbu!*] En mezepoko ofte tusis kaj ternis homoj, kiuj estis atakitaj de pulma formo de la pesto. Tial la malsanulo fervore respondis: “La Dio faru tion!“ [*Dejž to Pámbu!*]. En mezepoko malsanuloj atakitaj de pesto devis multe pagi por medikamentoj kaj kuracadon. Tial oni ĝis nun diradas: “*Platil jako mourovat.*“ Tio signifas: li pagis multe da mono. Sed nur malmulte da nuntempaj homoj scias, ke la adjektivo “*mourovat*“ [makula] origine sonis “*morovat*[2]“ [trafita de pesto].

Giovanni Bocaccio (1313–1375) verkis dum la jaroj 1348–1353 libron Dekamerono. Dek junaj homoj (7 virinoj kaj 3 viroj), kiuj fuĝis el Florenco, kie furiozis la pesto, en ekzilo rakontis cent rakontojn.

Inter aŭtoroj de nia urbo Brno ekzemple poeto Václav Renč (1911–1973) verkis en la jaro 1947 dramon “Nigra amanto“ [*Čern milenec*], kiu temas pri “nigra malsano“, la pesto. La pesto ne malaperis el la mondo. Ĝis nun ekzistas lokoj, naturaj fokusoj, kie homo


VMANA COSA ELHAVER COMPASSIONE AGLI AFFLITTI

Paĝo el Dekamerono /Vikipedio.

povas infektiĝi. En naturaj fokusoj ekzistas ronĝuloj kaj la pulo *X. cheopis*. Tial vojaĝantoj, kiuj volas viziti tiajn regionojn, devas esti vakcinitaj kontraŭ la pesto.



Entombigado de pestaj mortintoj en Tournai /Vikipedio.


# Informetoj

## Karaj,

eble vi jam scias, ke la PatroNia-tabulo en Jerusalemo estas renovigenda. Bernhard Eichkorn transprenis la taskon, kolekti la necesajn 4 500 €. Mankas ankoraŭ ĉ. 500 €.
Kiu donacos?
Bernhard Eichkorn
IBAN DE47 7509 0300 0006 4894 51
BIC GENODEF1M05

[Germanoj povas ricevi kvitancon por la impost-oficejo. Tiam post la ĝirado bv. skribi vian poŝt-adreson al: eichkorn.b@t-online.de – same alilandanoj, se germanlingva dokumento estas utila al ili.]

Kore salutas
Albrecht




La apuda bildo montras la Preĝejon Patro Nia (konata ankaŭ per la nomo Eleona), konstruita fine de la kvara jarcento. Ĝi estas fama pro la preĝo *Patro Nia*, kiu aperas sur ĝiaj internaj muroj en pli ol cent lingvoj, inter alie Esperanto.

El sveda Vikipedio



# Korektoj

1) Malbona retadreso

En n-ro 6 de Dia Regno, sur paĝo 141 ĉe Nederlando, estas skribita malĝusta retadreso de Gerda Dercks. La ĝusta retadreso estas gcamdercks@gmail.com

2) Ne kompleta bankkonto al KUNE

La bankkonto de la nederlanda KELI sekcio KUNE estas ne komplete menciita en Dia Regno n-ro 6. Mankas la IBAN kodo. Devas esti:
NL49INGB 000 1087575. Chr. Esperanto Verg. KUNE

3) Manko de antaŭsignoj

En n-ro 6 de Dia Regno, sur la lasta paĝo estis prezentita la psalmo MIA PREĜO. Pro iu nekonata kaŭzo, la diesoj (antaŭsignoj) malaperis. Pro tio ni denove publikigas la psalmon en tiu ĉi numero.

Ni bedaŭras la erarojn / Redakcio

---

# Skanita kaj skanota materialo en Vieno

Estimataj, mi ŝatus informi vin, ke la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko nuntempe skanas grandan parton de la publikigaĵoj pri la unuaj 31 Universalaj Kongresoj de Esperanto. La publikigaĵoj pri la unuaj 15 Universalaj Kongresoj jam estas legeblaj en la interreto, dum la venontaj semajnoj ni iom post iom enretigos pluajn skanaĵojn.

Universalaj Kongresoj 1905-1939
http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/23525.htm

Skanitaj libroj
http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm

Skanitaj periodaĵoj
http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm

Korajn salutojn,
Bernhard Tuider

# Mia preĝo

HERR, MEIN BETEN




Psa 141,2

HERR, MEIN BETEN • nGL 98 • M kaj aranĝo: © Matthias Kreuels (* 1952) • E-adapto: Albrecht Kronenberger 2015-07-21 • kun afabla permeso de la Komponisto

KRISTANAJ FONTOJ:
http://dli-info.net/urban/static/kantoj/Mia_pregho_valoru.pdf